

KOMUNIKOJ DE LA DIREKCIO

Sub tiu titolo ni respondos la demandojn, kiuj ne necesigas leteron. Kiu deziras privatan respondon, tiu bonvolu skribi per poŝtkarto kun parto por respondo pagata.

➤ S-o A. BARBOT estas nur presisto kaj ne libristo. Tial oni sin turnu al li nur por l'abonoj. Ĉiuj ceteraj leteroj aŭ mendoj devas esti adresataj *rekte* al la Direktoro de E. K.

➤ Niaj abonintoj de Belglando ricevis tre malfrue la decembran numeron de E. K. Ili bonvolu senkulpigi nin la poŝto estas la sola kulpulo. Denove, la paketo da revuoj por Belglando estis disigita kaj sendita erare al la Estro de l'espe antista grupo Lovena, kiu afable ĝin transdonis al nia Rajtigitio.

Respondoj al Diversaj : ➤ S-o R. C. MURCIA Artikoleto ricevita, koran dankon.

➤ S-o P. T., PARIZO Ricevis v. artikolon pri « Rusa soldato » ; enskribis vin kiel subskribanto al la « Preĝaro

➤ S-o NILS O. SKAARE (Norvegl.) « La knabo kaj la vulpo » ricevita, aperos en ia venonta n-o.

➤ S-o E. J. W. LOVENO (Belgl.) : Bone ricevis v. sendaĵon. Mi respondos letere.

➤ S-o A. S., FLAMERANS Respondos al vi letere. Plezure mi akceptas.

UNIVERSALA INFORMADO (U. I.)

Anoncoj, komunikoj de U. I. estu sendataj, kun antaŭa pago, rekte al la Direktoro de la reruo.

Abonintoj de E. K. povas komuniki al ceteraj legantoj ĉion, kion ili volas, pagante por unu vorto kvin centimojn. Vorto da pli ol dek literoj kostos duoble ; — vorto da pli ol dekkvin literoj kostos trioble ; vorto da pli ol dudek literoj ne estos akceptata.

Loĝado en Franclando : ➤ JUNULO estus akceptata kiel lernanto aŭ loĝanto en la domo de la Direktoro de E. K. Modera pago.

Gazetoj : ➤ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO : 1 frank. — Unuiĝo poŝta : 1 fr. 50 — Direktoró-Fondatoro : XAVIER CASIER, Premiita de Akadémio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de « Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

➤ LE GLANEUR, Literatura, scienca, muzika kaj bibliografia. — Revuo monata. — Abonkosto : Belgujo : 2 fr. — Ekster Belg. 3 fr. — Administracio, redakcio kaj anoncoj : 46, rue Vanderkindere, Uccles (Bruxelles).

➤ LA CARTE POSTALE ILLUSTRÉE (Ilustrita Poŝta Karto. Unu num. 30 centimoj. Abono : 3 fr. Ekster Franc. 4 fr.) Oni sendas n-on senpage post peto per ilustr. poŝkart. — 7, rue Pierre-le-Grand, Paris. VIII.

➤ GUIDA CARTOFILA ITALIANA, belega rev., interesege por kolektist. de poŝtk. de « ex-libris » kaj markoj datmemorigaj. Direkt. Grafo D. Cumbo, via S. Maria la Porta, 9. Messina. Abon. kun rajto por unu enpresó de koresp. 3 fr. en Itall. 4 fr. ekstere.

Korespondado : ➤ S-INO JANE PARIS, Les Hommeaux, Lion d'Angers, (M.-et-I.), dezir. korespondadi per ilustrit. poŝkartoj aŭ leter. kun ĉiuland. Esperantist.

Kolektistoj : ➤ S-o VARJU Endre, Budapest VI, Izabella utca, 82, I, 9, kolektas kinterŝanĝas uzitajn poŝtm.

➤ **ESPERANTA-KARTOFILATELA KLUBO (E.K.K.)**, sola klubo kartof.esperant. Jara kotizaĵo : 2 fr. 50. Ĉiu aliĝanto ricevos la revuon: *Le Carto-Philatélique Journal*, oficiala organo de l'klubo. Direkcio 91, rue de Dunkerque, Paris.

➤ **Muziko** : Preludo sur blankaj klavoj; Romanco; Preludo sur nigraj klavoj; verkis G. Kolowrat (por piano). Kosto : 15 centimoj; afrankite : 20 centim kiujn oni pagu sendante al l'aŭtoro *du* poŝtkartojn kun repondo pagita, lasinte sen skribo la respondajn kartojn.

➤ **Fotografajoj**. — S-o Jakobo Meazzini (vidu adreson en la nomaro de la Rajtigitoj) skribas al ni « En la venonta somero mi deziras presigi artikolon en la itala monata gazeto *Varietas*, kun la ĉefaj ilustraĵoj de eminentuloj esperantistaj. Tial mi petas samideanojn, ke ili bonvolu sendi, por tiu dato, kelkajn belajn fotografajojn. »

➤ « **La Nova Rassegna** », monata revuo, eniras ĝian trian jaron. Ĝi ĉiam pli dikiĝas kaj aperas ĉiumonate pli interesa ne nur al italoj, sed plie al eksteritaloj. Estas tre gravaj la verkoj pri *Serbo-Kroata literaturo*. Krom tio ĝi publikigas artikolojn literaturajn, artajn, kritikajn studojn, sciigojn historiajn, paĝojn de fremdaj

Sekvo p. V.

Societo Espero Katolika

CELO Disvastigi Esperanton en la mondo katolika; produkti, traduki, dissemi katolikajn verkojn; organizi klubojn, kunvenojn, kursojn pri Esperanto, en la katolikaro.

KONDIĈOJ : Esti katolika; pagi jaran kotizaĵon minimume da 1 franko. (Ĉiu donacinta 10⁰ fr. estos « Bonfaranto »).

SOCIETANOJ : Aprobantoj, Adeptoj, Fervoruloj, Elektistoj.

FAVOROJ SPECIALAJ AL ĈIUJ SOCIETANOJ : ili ĝuos rabaton da 0 fr. 50 por aboni la Revuon, rabaton da 0 fr. 20 *por cent.*, por presigi komunikojn en *Universala Informado*; rabaton da 0 fr. 50 por aboni *Oficejon de libraj informoj*.

KLUBOJ : Kiam estas almenaŭ ses anoj de S. E. K. en ia urbo, ili povas kuniĝi, elekti komitaton kaj peti aprobon de la Direktoro de S. E. K. Klubo tre utilos : 1^o por helpi klubanojn en akirado perfekta de la lingvo Esp.; 2^o por krei rilatojn inter diversnaciaj Klubo aŭ Esperantistoj katolikaj; 3^o por kunlabori internacie pri socialaj, religiaj, literaturaj, artaj, komercaj aferoj, k. c. Por faciligi tiajn rilatojn tre gravas, ke ĉiu Societano konigu sian specialaĵon aŭ profesion. Ni do proponas krei jenajn Fakojn en S. E. K. I, Religio. II, Socialaj studoj. III, Literaturo. IV, Artoj. V, Komercio kaj Industrio. Aliaj Fakoj formiĝos laŭbezzone. Ni do petegas tiujn, kiuj sendos aliĝon al S. E. K., klarigi samtempe en kia Fakoj ili deziras enskribiĝi. Ni senpage publikigos unufoje plenan adreson kaj specialaĵon de la Societanoj.

TRE GRAVAS POR NIA ENTREPreno, KE ĈIUJ KATOLIKAJ ABONANTOJ DE E. K. ENSKRIBU SIN EN S. E. K.

ESPERO KATOLIKA

REVUO MONATA

ANIMO EN MALLIBEREJO

EDUKADO DE SURDA-MUTA BLINDULINO

(de Profesoro Louis Arnould ¹).

En epoko kiam la monaĥinoj estas senkompate kaj maljuste forpeditaj de la franca registaro, estos eble interesa raporti pri unu el la plej belegaj kaj humanaj faroj de tiuj karitemaj apostolinoj la edukado de surda, muta kaj blinda knabino.

Marinjo Heurtin elŝajnis vere idiotulino, kiam ŝia patro kondukis ŝin al la monaĥinoj de la Saĝo, en Larnay (Larne) apud urbo Poitiers (Puatje) en centra Franclando. « Ŝia besta fizionomio aperigis sovaĝan naturon; tre malkvieta, ŝi ne parolis kaj ne aŭdis ŝi estis naskiĝe surda-muta. Per ŝiaj okuloj helbrunaj, plenaj je verdaj rebriloj, ŝi rigardis ĉiuflanke, sed ŝi ne vidis ŝi estis naskiĝe blinda. Ŝajnis ke naturo furiozis, de l'unua horo, kontraŭ tiu ĉi mizerulino, por fermi ĉiujn pordojn per kiuj animo homa povas komunikiĝi kun ekstero; ĝi lasis al ŝi nur unu senton palpado; per ĉi tiu la malfeliĉa kreitaĵo konis malklare ke ekzistas alion krom ŝi, — kaj ŝi koleretiĝis tial ke ŝi ne povis ĝin atingi. — « Ne vidi kaj ne aŭdi! Ĉu vi sufiĉe imagas, elokvente diris pri ŝi S-o Brunetière en publika kunvenode l'Akademio franca, la 23^{an} de novembro 1899, — kiom da mallumoj laŭlitere amasiĝas en tiuj du vortoj! Ĉu vi imagas, en tia nokto, la malliberecon de l'inteligento! Ĉu vi imagas, tiun malĝojegon sentadi per palpado, ke mondo ekzistas, kaj serĉadi je la muroj de karna malliberejo malfermajon al tiu mondo, kaj ĝin ne eltrovi!... » ².

Marinjo Heurtin ne estis la unua mizerulino ricevita en Larne. Jam unu knabineto « blinda, surda kaj muta je ŝia tria jaro, pro ekscitoj kaŭzataj de la militado de 1870, estis instruita de Fratino Sankta Medullo. F-no Medullo mortis la jaron antaŭan; sed ŝi formis lernantinon, Fratino S-a Margareto, kiu konsentis provi pri Marinjo Heurtin la metodon kiu tiel bone sukcesis pri Marta Obrecht. La nova okazo estis ja pli grava ol la malnova, tial ke Marinjo nenian estis vidinta aŭ aŭdinta eĉ dum kelkaj jaroj, ĉar ŝi *naskiĝe* suferis sian triopan malfeliĉaĵon.

1. UNE AME EN PRISON (histoire de l'éducation d'une aveugle-sourde-muette de naissance) ET SES SŒURS DES DEUX MONDES. Troisième édition à jour et doublée, précédée d'une lettre de M. Georges Picot; par LOUIS ARNOULD, Lauréat de l'Académie Française, Docteur ès-lettres. — H. Oudin, éditeur, Paris et Poitiers. — La eltiraĵoj de tiu interese ga verko estas tradukitaj kaj publikigitaj kun permeso de l'aŭtoro kaj de l'eldonisto, kiujn ni tre sincere dankas. *La revuoj esperantistaj ne devas eldoni tiujn paĝojn sen permeso.*

2. *Une âme en prison*, p. 16-14.

Tamen Fratino S-a Margareto komencis l'instruadon de sia lernantino. La detaloj pri la metodo uzita estas tiel gravaj, ke ni ne kuraĝas ilin mallongigi.

« Rimarkinte, diras S-o Louis Arnould, ¹ ke Marinjo speciale ŝatis poŝan tranĉileton, kiun ŝi alportis el sia domo, Fratino S-a Margareto ĝin forprenis de ŝi. Marinjo koleris. Ŝi ĝin redonis al l'infano kaj igis ŝin meti ŝiajn manojn unu sur l'alian, kiel unu tranĉante l'alian. — kio estas etigita signo por montri tranĉilon en lingvo de surdo-mutuloj; poste ŝi reprenis la ilon la knabino incitiĝis, sed tuj kiam ŝi imagis fari mem la signon, kiu estis montrita al ŝi, oni definitive redonis al ŝi la tranĉilon. La unua paŝo estis farata: l'infano estis kompreninta, ke rilato ekzistas inter la signo kaj l'objekto.

« L'instruistino daŭris uzi tiun metodon. Ŝi konis per la onklino de Marinjo, ke tiu ĉi precipe ŝatis panon kun ovo; tial oni ofte donis al ŝi ovon en la manĝejo. Iam, post kiam ŝi avide palpadis sian ovon, la Fratino ĝin forprenis, farante sur ŝiaj manoj la signon difinitan por ovo. L'infano koleris, sed ne refarinte, tiun tagon, la novan signon, la ovo ne estis redonata al ŝi, kaj anstataŭ ĝi oni alportis karnon, Ŝi ne estis kontenta kaj jaluze palpadis en la teleroj de siaj najbarinoj, por koni se oni donis al ili ovojn. La morgaŭan tagon, oni remetis ovon en sian teleron; ŝi ekkaptas ĝin, oni ĝin forprenas de ŝi refarante la signon, kaj tial ke ŝi ĝin refaras mem, ŝi fine ricevas la tiel deziratan ovon.

Tial fariĝis pri pano, pri ceteraj nutraĵoj, kaj eĉ pri la manĝilaro. Post kelke da tempo, oni preparis nenion por ŝi sur la tablo de l'manĝejo, kaj ŝi tiam kutimis alvenante peti per ellernitaj signoj ĉion, kio estis al ŝi necesa.

Poste oni instruis ŝin per eta kuirilaro, kiun ŝi ŝatis palpadi dum horoj tutaj.

Oni do igis ŝin koni unuan *vortaron*, se eble tiel diri; vortaron esence sintezan, en kio ĉia signo reprezentas unu objekton. Sed estis neeble daŭrigi longe tian metodon kaj ŝarĝi ŝian memoron per signoj sufiĉe multaj, por ke ĉia reprezentu senkonfuse unu objekton ĉu eĉ estis eble eltrovi sufiĉe da simplaj signoj por tio? Necesiĝis ekuzi la metodon analizan. Tion faris Fratino S-a Margareto instruante sian lernantaron pri l'alfabeto *daktilologia* ², kiun la surdo-mutuloj studis antaŭ la eltrovo de voĉa metodo, nomata *Milana*, kaj kiun multaj el iliankoraŭ uzas. Sed dum ordinaraj surdo-mutuloj vidas la signojn, oni devis, nature, ilin *meti*, por tiel diri, sur la manon de l'infano, por igi ŝin senti ilin.

Ĉiam procedante de konataĵo al nekonataĵo, la Fratino montris al sia lernantino samvaloron de tiu signo etigita, kiun ŝi unue ellernis, kun aro da signoj respondaj, kiuj estas kiel la moneroj de ĝi.

Tial l'infano baldaŭ povis laŭ sia deziro montri tranĉilon, ĉu per la

¹ P. 16 kaj sekv.

² Per diversaj manieroj aranĝi kaj montri fingrojn.

etigita signo de sia unua ellernado, ĉu per la kvar signoj de la dua. La surdo-mutulineto disponis novan lingvon per kiu oni povis igi ŝin koni aĵojn senlime. Ŝi parolis iamanire. Oni devis nun liveri al ŝi vidon, tio estas kapabligi ŝin legi.

Tion faris Fratino S-a Margareto instruante ŝin pri Braille'an alfabeton, tio estas pri literoj pikitaj sur papero por blinduloj. Oni montras al ŝi novan samvaloron, tiun kiu ekzistas inter la aroj da pikajoj kaj la literoj montrataj per signoj, kiujn ŝilaste ellernis: kaj tiu rova progresado efektiviĝis tut-nature.

Tial la unua edukado de la malfeliĉa infano fariĝis laŭ tri diversaj gradoj 1^o por penetrigi etojn da lumo en ŝia mallumigata animo, oni dresis ŝin montri ĉian objekton per signo laŭ mimlingvo; 2^o oni agis kun ŝi kiel kun surdo-mutulino instruante ŝin pri alfabeto almetita sur ŝian epidermon (daktilologio); 3^o oni agis kiel kun blindulino instruante ŝin pri Braille'a alfabeto, kiu kapabligis ŝin legi. Tiaj estis la persisto senlaca kaj l'amema pacienco de l'instruistino, tia ankaŭ la natura viveco de l'inteligento de la lernantino, kiu rapide pligrandiĝis per ĉi tiuj progresoj, ke tiu surpriziga laboro cerba, — kies aktivecon ni povas apenaŭ konjekti, — plenumiĝis ne trolongè, en la daŭro de ĉirkaŭ unu jaro.

(SEKVO VENOS),

Esperantigis Profesoro E. Lime.

HOMO

Homo, kreanta ion per genia ago,
 Vi estas Dia imago!
 Se teron forgesante, servas al ĉielo,
 Vi ekfariĝas anĝelo!

Premata de mizero, se ploras en domo,
 Vi restas simpla la homo;
 Zorgante nur pri manĝo kaj bona digesto,
 Vi egaliĝas al besto!

Se ideon nenian havas en la cerbo;
 Vi malaltiĝas ĝis herbo;
 Se vin ne altiradas Vero, Belo, Bono,
 Vi similiĝas al ŝtono.

Tentante do aliajn por sia agrablo,
 Vi kaptas pli ol diablo!
 Nur unu vi ne povas esti — vera Dio,
 Nek ekfariĝi — nenio...

Prof. A. DOMBROVSKI.

HEJMO SANKTA JOHANO POR LEPRULOJ

EN MANDALAJ, Birmujo (*Sekvo*)

Krom apartigo de la seksoj kaj observado de la domordo, nenia regas devigo en la Hospitalo. Kiu vidas la ludadojn kaj amuzadojn de la malsanuloj, ĉe kiuj l'epidemie ne progresadis ankoraŭ troe, tiu ne kredus havi antaŭ siaj okuloj ekzemplojn de la viva morto.

La konstruado kaj l'organizado de tiu modela instituto postulis la elspezon de la tuta sumo kolektita. — 250.000 rupioj, t. e. ĉirkaŭ 330.000 markoj laŭ germana mono, estis pagitaj por la sekvantaj laboraĵoj ebenigi 14 hektarojn da lando; starigi lignobarilon rondè je 300 m. longan; aranĝi 295 m. da ŝtonetigitaj vojoj kun 20 tegmentitaj; konstrui domegon da 79 m. longe kaj 15 m. larĝe; sep apartajn pavilonojn po 43 m. longe kaj 7 m. larĝe por malsanuloj; poste organizado kaj konstruado de kuirejoj, provizejoj, lavejoj, banejoj, k. c.; fosado de putoj, de akvujo kapabla enhavi 145 hl.; 1516 m. da akvokonduklaro al ĉiuj konstruaĵoj kun feraj tuboj; interligo de la kuirejo kun la ĉefkonstruaĵo kaj la pavilonoj per 600 m. da tegmentitaj koridoroj; aranĝo de lumiga ilaro; fine kreado de konvena lasta ripozejo, de tombejo por la lepruloj elsuferintaj.

Tamen multaj estas ankoraŭ bezonaj unue loĝejoj kaj laborejoj por speciala kuracisto kiun la Anglaj estroj deziras meti al la dispono de l'Instituto, kiel eble plej baldaŭ; poste legumĝardenoj por havi bonajn legumojn je malkara prezo; ludoplacoj por doni distriĝojn al la malsanuloj; fine elektra maŝinaro kiu ne nur donus brilan lumon, sed samtempe liverus forton por la movilaro de la kuirejo kaj de l'akvopumpilaro.

La elspezoj por unu leprulo estas meze 7 rupiojn. Por tiuj zorgatoj, kiuj laŭ la leproleĝo (*Leper Act*) estas transdonataj de la poliestroj al la Instituto, la Angla registaro pagas la elspezojn. Por tiuj el urbo Mandalaj, la Hejmo S-a Johano ricevas meze 5 rupiojn. Sed por ĉiuj ceteraj malsanuloj, — kaj tiuj estas la plej multaj, — l'Instituto estas limigata per la bonfaraj donacoj. La pastroj kaj la flegistinoj ne petas por si ili, kiel la kuracisto, faras sian malfacilan samaritaĵon sen ia rekompenco. Ili petas por la malfeliĉaj lepruloj, kiuj ĉe ili trovas rifuĝejon kaj flegojn, sen diferenco de raso aŭ nacio, de profesio aŭ religio (ja neniu el la zorgatoj estas devigata fariĝi kristano kaj nur tiu, kiu tion postulas, estas allasata, postkonvena preparado, al la bapto).

La donitaj detaloj sufiĉos por montri, ke la Hejmo Sankta Johano, loko de plej nobla kaj plej pura homamo, nur povas ekzisti, se daŭre malavaraj bonfarantoj provizo ĝin je mono. Ĝis nun, ĝi trovis subtenon inter altklasuloj. El la sep pavilonoj unu portas la nomon de l'Imperiestro de Aŭstrio, alia tiun de la germana Imperiestro, tial ke ili estis konstruitaj dank'al la grandanimaj donacoj de l'ambaŭ monarkoj. La meza konstruaĵo estas fondaĵo de Princo Johano de Lihtenstein, de

Baronino Gargan de l'imperiestra Konsilanto Staŭd kaj de la familio Wehinger. Tiel noblaj ekzemploj estu imitataj!

P-o Wehinger, la kreinto de l'Instituto, la senlaca bonfaranto de la lepruloj, la « granda propetanto », ne vivas plu. Antaŭ kelkaj monatoj la morto forprenis lin de sia laborado kaj de siaj protektatoj. La helpado de tiuj, kiuj ne nur konfesas per la lipoj l'ordonon de l'amo al proksimo, sed ankaŭ plenumas ĝin per siaj agoj, kun helpo de Dio, igos la posteulojn de P-o Wehinger kapablaj daŭrigi ilian entreprenon ¹.

El Germane tradukis S. SCHROODER, de Wien, Aŭstrio.

POR LA PROTEKTADO DE LA JUNULINOJ.

De la 19^a de aŭgusto 1897 ekzistas internacia societo por la Protektado de la junulinoj, kiu celas 1^o unuigi por agado komuna societojn aŭ instituciojn, kiuj en diversaj landoj klopodas por protekti la junulinojn; 2^o faciligi la fondon de similaj societoj en ceteraj landoj.

La centro de la Societo estas en Friburgo (Svislando). Ekzistas ankaŭ Sekretariejoj sinjorinaj en multaj landoj: en Franc-, German-, Anglo-, Aŭstro-, Hungar-, Belg-, Itallando, k. c. La aninoj iras al la stacidomoj por atendi la junulinojn anoncitajn, (servistinojn, instruistinojn), trovas por ili hejmon, kie ili loĝadas for de ĉiu morala danĝero, ĝis kiam ili eniros familion.

Se junulinoj vojaĝas en alian urbon, oni same akompanas ilin al la stacidomo kaj anoncas ilin al la Sekretariejo de l'urbo, kien ili iras. La Societo ankaŭ serĉas situaciojn por la junulinoj. Monata revueto (france redaktata) publikigas la sciigojn pri tio.

Tia societo fariĝas pli kaj pli necesa. Lingvo Esperanto povas al ĝi doni tre grandan helpon, tial ke la societo zorgas pri junulinoj el ĉiuj landoj.

Ĉiuj katolikaj esperantistoj volus helpi agadon tiel bonegan. Jen nova kaj interesa celo por kluboj de S. E. K.² M. M.

KATOLIKAJ PAĜOJ

Jean des Tourelles skribis al la tradukinto de la rakonto, kiun ni hodiaŭ eldonas « Jean des Tourelles sendas siajn plej sindonemajn sentojn al S-o Denoncin, kaj donas al li, por estanto kaj estonto, ĉiun permeson por esperantigi siajn modestajn skribaĵojn. Li estas tre feliĉa, ke ili helpos iom la prosperadon de la revuo direktata de sia karega amiko, P-o Em. Peltier. »

Ni tre dankas J. des Tourelles pro lia afabla permeso: ni plezure utiligos ĝin, kaj ni esperas ke niaj legantoj tion ne bedaŭros.

J. des Tourelles estas bonstila, delikata, sprita kaj gajiga verkisto katolika. De multaj jaroj li skribas *ĉiusemajne* artikolon por diversaj ĵurnaloj aŭ gazetoj Tiuj

¹ La nuna posteulo de P-o Wehinger estas P-o J. L. Lafon, Estro de Hejmo Sankta Johano.

² Tiuj, kiuj deziras detalojn pri la Societo por la protektado de la Junulinoj, sin turnu al la Direkcio de E. K.

artikoloj aparte eldonitaj formas nune tri aŭ kvar volumojn ilustritajn, kiujn ni varme rekomendas al tiuj kiuj povas legi france. *Sur le vif, Tous d'après nature, Envolez-vous*, estas ĉarmaj libroj, veraj kaj humoraĵaj pentraĵoj de la francaj moroj.

ĈE LA BORDO DE L'MARO

Nenio pli agrabla ol konsideradi niskiton, kiu ĉe la bordo de l'maro amuziĝas.

Rozkolora pantalono per genuoj subtenata, nudaj piedoj en ŝuetoj faritaj el ŝnuro, la kapo ŝirmata per larĝa ĉapo kun rando mallevigita, la knabeto multe penas per ŝovelilo malkara por konstrui el sablo fortikajon kiu kontraŭstaros al la maro ĉiufoje kiam ĝi alfluos.

Tiel serioza kiel plenpotencula ministro kaj tiel vigla kiel kvindekono da griloj, la infano disbatas la flavajn sablerojn de kiuj defluis la ondoj kaj la areno varmigata de la postagmeza suno dissaltas per lia bato...; la braketoj kaj la tuta estaĵeto fervore moviĝas...; la ŝovelileto pli kaj pli rapide ŝovelas...; la remparo pli altiĝas...

Ĉar la knabeto, kiel Ludoviko dekvara, elpensis grandiosajn intencojn kaj noblajn pensojn... li efektive, — ĉu estas eble! — intencis kontraŭmeti netransireblan digon por haltigi la bolantan maron dum leviĝos la alfluo... En la cerbon de tiu ĉi estaĵeto eniris la glorama pretendo diri al Oceano Ne iru vi pli malproksimen!...

Jes, certe, la knabo nenion preterlasas por atingi tian rezultaton; almenaŭ du horojn aŭtaŭe li pripensis por kombini la detalan planon, kiu devas kontraŭbatali la maron — Kavaĵoj, krutaj palisaroj, plataĵoj formitaj el rektanguloj sufiĉe regulaj simile al brikoj, turoj, kazematoj, kaj cetera!

Li ne perdas la tempon por rigardi la ondon kiu alproksimiĝas furioze ŝaŭmanta, ĉar nia lerta taktikisto scias, ke la pasinta tempo ne estas revenebla kaj tio ĉi povus utili al la malamiko. tial li ordonis ke sia guvernistino staru kiel aŭtaŭposteno. Tiu-ĉi guvernistino estas Britanino, korpe forta, ruzula, tio ĉi vidiĝas en ŝiaj okuloj; kuraĝa, ĉar ŝia patro estis brava maristo, kiun persekutis ĉiuj maroj; sekve ŝi mem multfoje konatiĝis kun maraj aferoj kaj prenis sur sin averti sian junan mastron pri la marŝado de l'malamiko.

Ĉu mi havas ankoraŭ tempon? ekdemandis li de tempo al tempo.

— Jes, mia Karulo.

— Kiom da tempo?

— Dudek minutojn...

Kaj nia knabeto, ŝajne certiĝinte pri la sukceso, daŭrigas akceli la penadon, multigas siajn penojn.

Ne malpli serioza ol la knabo, lia patro, senatano, rigardadas la maron.

Estas efektive mirinda vidaĵo, tiu-ĉi maro, kiam la alfluo alportas tien, ĉe la bordo, ondojn tumultajn kaj alten elŝprucas blanka ŝaŭmo...

Malproksime estas io grandega kaj nuba kiu moviĝas kaj antaŭsaltegas, simile al dikaj amasoj, por atakegi la bordon... la senfina dube-

verda supraĵo subleviĝas kvazaŭ ĝi kolerus kontraŭ la granitaj ŝtonegoj ĉiam batataj, neniam kripligataj.

Tiel malproksime, kiel la vido povas sin etendi formiĝas minacaj sulkoj kaj profundegaĵoj; dubeverdaj supreniĝas pintoj kiuj alvenas seninterrompe el la fundo de la maro...; tial, sur la spaco da mejlo, la ondoj muĝantaj stariĝas simile al ĉevalo per sprono pikita, ili timigaj kurbiĝas dum la sekvanta sekundo por pli potence supreniĝi kaj bati la ŝtonegojn, kiuj malaperas sub la venkinta marŝaŭmo.

Transirinte la ŝtonegojn la amaso de l'ondoj disverŝiĝas, blanka pro kolero, sur la deklivon de la bordo; sed super tiu amaso, kiu ekmortis ĉe la bordo, alvenis alia pli alten kaj pli malproksimen... Kiel skadroj kiuj venas el la fundo de l'horizonto, tiel la grandaj ondoj alvenas, neniam laciĝitaj, neniam venkitaj, kaj la areno senmova kaj la oceano daŭrigas la bataladon, kiu ĉiam mirigas ĉiun rigardanton.

Kiel aliaj, la patro de nia militama knabo estas ravata de la mirinda vidaĵo... Li sendube ne memoras plu siajn flatemajn elektintojn kaj la profiteman gazeton, kiu ĉiutage lin gratulas; lia ĵurnalo falas teren kaj la okuloj fiksitaj sur la maro li forgesas...

Li forgesas la lastan politikan bataladon pri sia elekto, kies sekvoj multe terurigiĝis por li, kiu ŝuldis la venkon al rimedoj pli aŭ malpli justaj...

Li forgesas sian voĉdonadon pri tiuj leĝoj, kiuj, per unu plumstreko, eligas la plej respektindan rajton por ĉiu dediĉi sin al la gloro de Dio kaj al la edukado de geknaboj, kaj samtempe malhelpas malriĉulojn kaj laboristojn elekti laŭ sia kredo la necesan instruadon.

Li forgesas la elpelitajn, kontraŭ justeco, gemonahojn, kaj aliajn bedaŭrindajn okazintajn faktojn, kiuj rezultas de lia konduto.

Li forgesas sian malprudentan ribelon kontraŭ Dio, kaj la krion, kiun li elvokis « Ni pereigos la kristanan religion kaj post apenaŭ dudek jaroj nenia preĝeja turo staros en nia lando ».

Li forgesas...

— Prosperis al mi konstrui! ekkriis subite la knabo.

Tia ekkrio skuis nian senatanon; li turnis la kapon kaj ekvidis sian filon starantan sur la konstruita fortikaĵo, kiu havas ĉirkaŭ kvindek centimetrojn alte. Apoginte sian manon sur la tenilon de la ŝovelileto, la knabo rigardadas l'oceanon kun triumfaj fulmoj en la okuloj, kaj esprimas sian revadon fiere dirante: « Nun mi venkos! »

« Malsaĝuleto, diras la patro, levanta siajn ŝultrojn, vi laboregis vane; ĉu vi ne sentas la senpotencon de via fortikaĵo por haltigi la penadon de tiu ĉi oceano? Unu el tiuj ondoj povas detrui vian ellaboraĵon. »

« Ĉu vere? » aldonis la kortuŝata knabo kiu demandis sian gubernist-inon pri tio.

« Jes, mia karulo, respondis la gubernistino; sed ne decas, ke via patro moku vin.

« Mi estus scivola koni la motivon, eklaŭtis la senatano mireganta.

« Ĉar, respondis la Britanino, rigardanta rekte al sia mastro, via tuta laborado malpia kontraŭ Dio entute perdiĝados kaj havos la saman sorton. »

JEAN DES TOURELLES

(El france tradukis A. DENONCIN).

(*Eldonado malpermesata*).

NOTETOJ

NEKROLOGIO. Ni petas viajn preĝojn por nia aboninto S-o Lucien Bernot, Lernanto de l'Nacia Konservatorio de Muziko ano de la Societo de Aŭtoroj kaj Muzikverkistoj, kiu mortis la 5^{an} de novembro, je sia 25^a jaro.

PREĜARO. Diversaj amikoj petas de ni, ke ni eldonu PREĜARON KATOLIKAN, Esperante kaj Latine. Ni tion tre deziras. Sed en nuna stato de Esperanto la katolikaj eldonistoj ne konsentas eldoni librojn sen serioza espero vendadi ilin... Se ŝufiĉe nombraj esperantistoj subskribos por la eldonado, ni rapidos kontentigi ilin. La volumo kredeble ne kostus pli ol 2 frankoj (sen la kosto de sendo). Ju pli multaj estos la subskribantoj, des pli malgranda la prezo l'Preĝaro.

« KATO KUN BOTOJ ». La plimulto de la esperantistaj gazetoj anoncis tiun libreton de nia ILUSTRITA ESPERANTA BIBLIOTEKO POR INFANOJ. Ni tre dankas ilin. Kelkaj tamen tute forgesis ĝin.

ŜERCAĴO (de G. Kolowrat). — (Vidu de lastan, n-on de E. K.) La respondo estas: Se la lasta persono prenas kun la pomo la pladon!

« KATOLIKA STELO ». Jam rondiris trifoje tra Hispanlando. « Katolika Stelo ». Manuskriptoj rondiraj estas tre bonaj rimedoj por lerni la lingvon. Tiuj, kiuj deziras partopreni al K. S. sin turnu al S-o Codorniu, Paseo del Malecon, C, Murcia.

PENSO

« Kiam oni volas utile riproĉi kaj vidigi iun ke li trompiĝas, oni devos observi kian flankon de l'afero li konsideras; ĉar ĝi ordinare estas vera je tiu flanko; kaj konfesi al li tiun veraĵon, sed al li malkovri la flankon je kiu ĝi estas malvera. Li kontentiĝos de tio, ĉar li vidos ke li ne trompiĝis, sed nur ne rigardis ĉiujn flankojn. Ja, ne koleriĝas iu tial ke li ne ĉion vidis, sed li ne volas rekoni ke li trompiĝis. »

PASCAL.

1 Kosto de ĉia volumo 2 fr. 50, aĉetebla ĉe nia O. L. I.